

# Pola Esperantisto Esperantysta Polski

XXXI JARO

NRO 12

DECEMBRO 1937

ELDONANTO — WYDAWCA

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

REDAKTANTOJ — REDAKTORZY

PROF. DR ODON BUJWID — MGR TADEUSZ HODAKOWSKI

Aperas la 20-an de ĉiu monato. Redakcian materialon oni petas sendi ĝis la 10-a de ĉiu monato. La redakcio estas rajtigita laŭ bezono ŝanĝi la tekston de manuskriptoj.

## JUBILEA KONGRESO DE ESPERANTO

Varzawa 7—14 aŭgusto 1937.

(Daŭrigo).

La Festo de Veteranoj estis impona manifestacio kaj deca honorigo de la mortintaj kaj vivantaj pioniroj de nia movado.

### Ĉe la tomboj de la Majstro kaj de Grabowski.

Lunde la tuta kongresanaro partoprenis solenaĵojn honore al la Majstro kaj al Antoni Grabowski.

Tiujn solenaĵojn antaŭiris meto de florkrono ĉe la Tombo de Nekonata Soldato. En ĉeesto de la kongresanaro, kies granda parto venis en naciaj kostumoj, prof. Bujwid kun aliaj eminentuloj de la movado metis florkronon sur la tombon. Tuj poste delegitaro de la blindula kongreso (kapitano Silhan, majoro Wagner, pastro van der Bosch) metis ankaŭ florkronon por honori la falintojn dum la milito. La blinduloj, havantaj en siaj vicoj multajn eksvidintojn, blindiĝintajn pro la milito, plej akre konscias, kiajn oferojn postulis la sanga batalo.

Per aŭtoj kaj fiakroj, disponigitaj senpage de la urbestro, la kongresanoj rapidis al la hebrea tombejo por honorigi la Majstron. Antaŭ la eniro ĉiu kongresano ricevis florojn por povi meti ilin sur la tombon. La

kongresorganizantoj bone ĉion aranĝis, pensinte pri ĉiu detalo.

Sur la tombo la kongresanoj ariĝis laŭlande en alfabeto vico. Oni aŭskultis paroladojn pri la Majstro kaj liaj noblaj ideoj. La paroladojn, disaŭdigatajn tra la tuta tombejo per laŭtparoliloj, faris prof. dro Bujwid, gen. Bastien, prezidanto de hebrea komunumo en Varsovio Mayzel, rabeno Pozner kaj s-ino Thilander. Precipe kortuŝiga estis la parolado de s-ino Thilander, kiu per voĉo, tremanta pro grandega emocio, esprimis la dankon de blinduloj al la granda bonfarinto de la homaro.

Komenciĝis marŝo de la popoloj antaŭ la tombo. Apud la tombo ekstaris la familio Zamenhof. Unua alvenis la kongresa komitato, metante belan florkronon. Poste laŭvice trapasadis la landaj grupoj. Ĉiu kongresano metadis siajn florojn honore al la Majstro. Kelkaj grupoj alportis belajn florkronojn. Ĉiuj popoloj, la tuta mondo, venis al la tombo de la majstro por honorigi la memoron de tiu, kies tuta vivo estis ja dediĉita nur al la homaro.

Efektiviĝis la profetaĵo de Leo Belmont, dirita post la morto de dro Zamenhof en la versaĵo „La enterigo de la Majstro“:

...„Kun verdaj standardoj amaso fidela  
Pilgrimoj al paceprofeta ĉi tomb’

Sur tero libera post multaj turmento  
De himno „Espero“ eksonos pasi’!  
Ĉe tombo grandega diverslandaj gentoj  
La manojn fratece etendos al si!

El tombo trankvila spirito de l'vero  
Elvonas kun beno kaj amo por ni!...“

Neforgesebla restos por ĉiuj tiu deca honorigo de la Majstro sur la loko de lia eterna ripozo.

De tie oni ekiris al la apuda katolika tombejo. Tie la kongresanaro honorigis la memoron de Antoni Grabowski, la patro de Esperanta poezio, amiko de la Majstro kaj fervorega esperantisto de la unua hor’.

Belan florkronon nome de la tutmonda Esperantistaro metis sur lian tombon la kongresa komitato. Prof. dro Bujwid kaj samideano Glück profundsente parolis pri Grabowski, kies nomo por ĉiam restos orlittere notita en la historio de nia movado.

### Laborkunsidoj de IEL kaj UEA.

Sub profunda impresado de la surtombaj solenaĵoj revenis la kongresanoj. Kaj kvazaŭ por forte substreki la egan diferencon inter la pasinteco kaj estanteco okazis laŭprogramme... apartaj laborkunsidoj de UEA kaj de IEL.

Unuigita estis la tuta kongresanaro sur la tombejoj. Kaj unuafoje disigita estis la kongresanaro dum la laborkunsidoj. Ĝis nun dum la universalaĵ kongresoj okazadis laborkunsidoj komunaj por ĉiuj kongresanoj. Nun - en la Jubilea jaro - laŭ ordono de la malpacantaj gvidantoj okazis apartaj laborkunsidoj por IEL-anoj kaj por UEA-anoj.

Sed la amasoj Esperantistaj estas esperantistaj. Kaj ili deziras pacon ĉiam, ne nur dum solenaĵoj sur tombejoj. Kaj ili tion klare diris en ambaŭ laborkunsidoj. Unuecon kaj pacon ili postulis. La gvidantoj ankoraŭfoje aŭskultis tion, kio jam manifestiĝis dum la solena malferma kunsido de la Kongreso.

En la laborkunveno de UEA estis donitaj detalaj klarigoj pri la situacio kaj la provizora komitato diris, ke ĝi estas preta al repaciĝo por unuigi la movadon.

En la laborkunsido de IEL la komitato deklaris, ke pro komencitaj traktadoj kun UEA dume detalaj klarigoj ne povas esti donitaj. Post tio s-ro Malmgreen, konata sveda propagandisto kaj estro de la propaganda filio de IEL, faris referaton pri la „Propagando“. La referato detale preparolis la propagandajn problemojn kaj montris kel-

kajn trafikajn ideojn. Ni tamen devas kun bedaŭro konstati, ke la referato multon perdis de sia valoro pro kelkaj malmolestoj de la aŭtoro, malaltigantaj ĝian nivelon. Tuj ĉe la komenco s-ro Malmgreen diris, ke „por la unua fojo en la historio de Esperanto estas nun aranĝata speciala laborkunsido por trakti la esencajn problemojn de Esperanto: la metodojn por venkigi nian lingvon“. La ŝatata preleginto bonvolu trastudi pli atente la protokolojn de la antaŭaj universalaĵ kongresoj Esperantaj kaj li certe konfesos sian eraron. Cetere estas ĉiam bone, se oni utiligas la spertojn de siaj antaŭuloj. Oni ŝparas tiam multe da tempo kaj laboro. Studinte la protokolojn de la kongresoj s-ro Malmgreen povus konvinkiĝi kun kia majstra precizeco kaj profundeco prilaboradis la propagandajn problemojn la bedaŭrinde frue forpasinta Robert Kreuz. El aliaj kritikindaĵoj ni citu jenon: raportante pri la Esp. bulteno de Sved - internacia gazet servo s-ro Malmgreen diras, ke la laboro por traduko de la bulteno, aperanta unufoje dum semajno kaj ampleksanta 3 - 4 paĝojn maŝinskribitajn de oficeja formato, estas heroo. Ni konas la svedan bultenon kaj opinias ĝin bona kaj utila, tamen-eĉ plej respektante la tradukan laboron pro tiu bulteno - neniel povas konsideri ĝin heroo. Ĉiu mezkvalita profesia ĵurnalisto sen pli granda peno farus tradukon de multe pli da paĝoj. Ni rememorigu ĉi-loke la siatempe eldonatan polan gazetan bultenon, alportantan efektive multegon da materialo, grandegajn artikolojn ktp. Ĝin faris diverstempe jen profesiaĵ ĵurnalisto, jen bonvala Esperantistoj - nefakuloj. Ĉu iu el ili fanfaronis pri tiu multe pli malfacila laboro? Ĉu ni a konata pola samideano Stanisław Essigman, kiu dum certa tempo faris la tradukojn, iam pretendis esti heroo? Ni ne kredas, ke en Svedujo oni akiras heroecon pro 2 - 3 hora laboro dum semajno. Do, iom pli da modesteco kaj - laŭ la propra diro de s-ro Malmgreen en lia referato - for la diletantismo!

### Teatra prezentado.

Vespere en la ejo de varsovia opero okazis Esp. teatra prezentado. Pro plendo, ke dum kelkaj antaŭaj kongresoj estis prezentitaj tro longaj teatraĵoj, iom penigaj por la kongresanoj, LKK aranĝis prezentadon de mallonga komedio pola „Consilium facultatis“, tradukita de Antoni Grabowski. Poste sekvis dancoj kaj kantoj. La aranĝo trovis ĝenerale plaĉon.

(daŭrigota).





## PRI LA ARTO DE TRADUKADO.

En numero 282 de 13 X 1937 de KURIER WARSZAWSKI, unu el plej malnovaj ĵurnaloj polaj, aperis interesa artikolo de Z. Rabska, kiu, mutatis mutandis, prezentas la staton ekzistantan en la esperanta literaturo. Ni prezentas ĝin en fidela traduko por pensigi tiujn, por kiuj la kampo de la esperanta literaturo ne estas indiferenta.

Ĉiam pli ofte, kun ĉiam pli granda zorgo pri sekureco de la nacia kulturo oni parolas ĉe ni pri malpurigado de la libreja merkato per fuŝaj tradukoj, el kiuj ĉerpas profitojn senrespondecaj eldonistoj kaj librovendistoj, ankaŭ tradukistoj kaj tradukistinoj, tradukantaj fremdajn verkojn en la polan lingvon, fuŝe, ke nur estu kiel eble plej rapide.

La sencio de la tradukistoj fariĝis jam proverba, kaj ĉasado je humoraĵ „floretoj“ el tradukitaj tekstoj servas kiel temo de spritaĵoj kaj anekdotoj.

Unu el recenzistoj de Rocznik Literacki diris, ke „malbonaj tradukoj kontribuas al konfuzo de sana lingva sento inter la legantaro“. Tiu aperaĵo estas maltrankviliga, precipe se temas pri la junularo, kiu devus formi sian lingvon sur belaj modeloj de la pola lingvo. Ni batas la veksonorilon, bedaŭrinde vane. Apud bonaj plenvaloreaj tradukoj ne ĉesas aperadi en libreja kontoro libroj tradukitaj el fremda literaturo, plenaj de kuriozaĵoj stilaj, ortografiaj kaj logikaj. Tiaj libroj estas atesto de malapero de civitaneca sento same ĉe eldonistoj, kiel ĉe tradukistoj, kaj minaco, kontraŭ unu el plej sanktaj naciaj trezoroj kia estas la lingvo.

Antaŭ ol komencos sian agadon la sekcio de tradukoj en la Konsilantaro de l'Libro, antaŭ ol ekvalidos novaj ordonoj, ĉesigante la memvolon de eldonistoj, indas pripensi, en kio konsistas bona kaj en kio malbona librotraduko.

Unua kondiĉo de bona traduko estas bona nega kono de la lingvo, en kiu oni verkis. Tiu kono devus posedi tute alian, pli profundan valoron por la tradukanto, ol por tiu, kiu flue paroluzas tiun lingvon. Ne temas pri kompreno de unuopaj vortoj, ĉar ĉiunmomente la tradukanton povas helpi vortaro. Temas pri tio, ke li konu ĉiujn ecojn de la fremda lingvo. La malbona traduko diferencas de la bona ne tiom per kvanto da gramatikaj eraroj, kiom per kvanto da neprecize asimilitaj lingvaj specialaĵoj. Se la tradukanto scias anstataŭigi specialaĵojn de la fremda lingvo per analogiaj specialaĵoj de la

hejma lingvo, li trovas la ĝustan vojon. Tiam li ne tradukos ekz.: „parbleu!“ — „tra blua!“ — sed li skribos: „je diablo!“, „diable!“, „diablo!“ ktp.

Eksterordinare grava estas por la tradukanto kono de la moroj de la nacio, el kies lingvo li tradukas. Tio permesas al li eviti logikajn erarojn kaj neprecizaĵojn, kiuj enkondukas haoson en la tradukon. Ni prenu ekzemplon: franca aŭtoro skribante pri lernejo, mencias lernantojn de la „unua“ klaso. Se la pola tradukanto skribos pri „unuaklasanoj“, li erarigos la leganton, ĉar klasoj en nia lernejo komenciĝas de la unua, sed en Francujo la lernado per ĝi finiĝas.

Do li devus skribi: „oka-klasanoj“, aŭ doni konvenan klarigon en subnoto.

Egale grava por la tradukanto, kiel la kono de la fremda lingvo, estas ĝisfunda kono de la propra lingvo, ĝiaj stilo, sintakso, specialaĵoj kaj tradicio. Kutime la tradukantoj tion malzorgas, ne klopodas pliriĉigi la stilon per funde polaj vortoj, variigi per ĉiam pli novaj esprimoj, je kiuj abundas la hejma lingvo. Vortoj eluzitaj kiel ludmarkoj kutime konsistigas tian senrespondecan tradukon, faratan mekanike, sen mensa fortostreĉo. Eĉ se ni ne komparados du tekstojn, por kontroli fidelecon de la traduko, tuj nin okulfrapos malglateco kaj malriĉeco de la traduka stilo, kaj tiu malglateco kaj malriĉeco ne estas io alia, ol manko de ĝisfunda kono de la propra lingvo.

Por bone traduki, oni devas antaŭ ĉio eniĝi en la spiriton de la lingvo. Bona traduko estas siaspeca „transpozicio“. La frazo, kiu aperigas dubojn, devus esti trapensita ne koncerne la vortojn, sed koncerne la intencon de la aŭtoro. La tradukanto devus pripensi la fragmenton, kiu antaŭas tiun frazon, simile kiel la fragmenton sekvantan post ĝi, kaj nur tiam li ĝisfunde komprenos ĝian sencan kaj klarigos la ĝustajn intencoj de la verkisto.

„Ja temas ne pri enhavo de la teksto, — opinias André Gide — oni devas traduki ne la vortojn, sed la frazojn kaj esprimi siajn pensojn kaj sentojn tiel, kiel ilin esprimus la aŭtoro mem, se li verkus en la lingvo de la traduko. Oni povas tion atingi nur helpe de oftaj trompoj kaj artifikoj“...

La rekomendataj de Gide „trompoj“ kaj „artifikoj“, aŭ simpladire stila neprecizeco, sendube ofte necesas por adapti la verkon, povas fariĝi dutranĉa glavo en la manoj de malzorgemaj tradukantoj.

Tiun indikon ni ne traktu tro serioze. La plej granda parto de francaj tradukoj estas simpladire libera transpozicio. Iu tradukin-

tino de malfacile tradukebla romano de Galsworthy estis tiel libervola, ke ŝi faris tre precizan resumon de la teksto, formetis ĝin por kelkaj monatoj, poste ne rigardante plu en la anglan originalon, verkis ĝin france, tute kvazaŭ ŝi mem verus la romanon...

Pri valoro de la traduko decidas ne nur laboro, sed ankaŭ talento. Ĝi inspiras la tradukanton, elvokas en li verkistan febron, kiu faciligas enigon en sferon de sentoj kaj pensoj de la aŭtoro kaj permesas esti kun-kreanto de lia verko.

Bona tradukisto, enkondukita en kreaĵon, insiste serĉas vortojn, kiuj ne nur ne fuŝas la intencon de la aŭtoro, sed, kontraŭe, reliefigus ĝin kaj aperigus klare, serĉas ilin kun tia fervoro, kiel poeto elektanta rimojn por strofoj de poemo. Kaj kiam li akiris la ĝustan vorton kaj la sole trafan, kiu al li mankis kaj kiu estis necesa por aperigi kaj substrekigi la kolorojn de la verko, li sentas profundan ĝojon.

En la antikva Romo interpretistojn de Ciceronaj verkoj oni nomis: Verborum pensitatores, kio signifas: pesistoj de vortoj...

Antaŭ ĉiu tradukanto, sur la tablo, antaŭ la teksto de la verko devus stari nevidebla pesilo. Sur unu ĝian teleron li devus meti la vortojn de la aŭtoro, sur la alian — analogiajn vortojn en la hejma lingvo. Nur kiam la ambaŭ teleroj atingis ekvilibron -- la traduko estas perfekta.

Tia mistika pesilo posedas multe pli grandan valoron ol ĉiuj vortaroj, gramatikoj kaj leksikonoj kaj estas ununura, ne preterlasenda ilo en la laborejo de la tradukanto.

Ni enpaŝas ĉi tie en nimbon mistikan, ĉirkaŭtante la verkon de kreanto. La arto de tradukado estas simila verkado kiel verkado de pentristo, skulptisto kaj poeto kaj povas havigi estetikajn impresojn simile kiel bildo, skulptaĵo aŭ strofo de poemo.

Bela, pura, riĉa lingvaĵo, kiun uzas la tradukanto, estas tiu liro, per kiu li ludas melodion, tiu marmoro, en kiu li elhakas formon, tiu koloro, kiu esprimas la ĝustan enhavon de la verko.

Netuŝebleco de la teksto estas iluzio. La tradukanto povas ĉiumomente doni al ĝi konvenan formon, pliprofundigi ĝin, levi aŭ plilarĝigi. Li povas ĝin regi, simile kiel artisto regas la kreaĵojn de sia spirito.

La arto de tradukado konsistas ĉiam en senĉesa, saĝa kaj gardema kontrolo de vortoj.

Formante malrapide kaj atenteme, vorton post vorto, frazon post frazo, la formon de la traduko — alivorte zorgante la ekvilibron de la pesteleroj, la tradukanto staras laŭŝajne senmove, sed rapida kaj nervoza pulso de vivo ne ĉesas en li bati. Ĉar el la vivo, el liaj multaj spertoj alkruras la necesaj vortoj kaj vortturnoj kaj kunmetiĝas je harmoniigita tuto de la teksto.

La tradukanto penas sur sia pesilo ne senvivajn, paperajn vortojn, sed vivan materion, kies formo dependas de lia volo. Unu neĝuste uzita vorto, unu nekonvene aplikita interpunkcia signo, kaj la konstruaĵo, kreita de li en peno kaj laboro, krevas, rompiĝas kaj disŝutiĝas.

*Trad. T. H.*

## SEN KRIO KAJ BRUO.

La Ŝtata Supera Kurso de Instruistoj en Warszawa festas dum kuranta jaro la jubileon okaze de sia 20-jara ekzisto.

Apenaŭ la suno de renaskiĝanta ŝtatlibereco kaj politika sendependeco ĵetis siajn unuajn radiojn sur polan teron, ĵus estas rivalvokita la instituto, en kiu povus profundigi siajn ĝeneralajn kulturon kaj profesion la instruistoj de polaj popollernejoj.

Antaŭ ĉio temis pri la preparo de vicoj de l'instruistoj, kiuj adaptus la ideojn de instruado kaj edukado al novaj realeco kaj esenco de hejmlandvivo. Temis aliflanke ankaŭ pri tio, por kiel eble plej rapide forigi la neglektojn kaj mankojn de tiamaj lernejoj, ĉar la okupaciaj lernejoj ne zorgis tro pri instruado kaj edukado.

Tio ĉi estas unu el multaj aliaj pruvoj, ke jam en unuaj komencoj de nia ŝtatreeksisto estis ĉe ni altgrade valorigita la pedagogia demando, kaj la edukado de infanoj starigita

sur unu el fruntaj lokoj en hierarĥio de gravaj ŝtataferoj kaj bezonoj.

Alia pruvo de zorgema rilato al eduka afero flanke de direktistoj de lerneja politiko estas, ke ili komisiis ĉiam same la instruadon, kiel precipe la gvidadon de la Kurso al homoj de vasta kaj profunda pedagogia scio, al personoj honore kaj fame konataj al tuta instruistaro.

Ne estas do mirinde, ke la Kurso indelplenumas sian taskon, ke estas jarjare plenigita de instruistoj, serĉintaj pluan pliriĝon de siaj animoj kaj profesia scio, ke el-lasis jam plu ol du mil da geedukitoj disjeditaj en tuta Polujo, eĉ sur ties plej malproksimaj anguloj.

Tiuj estintaj geedukitoj de la Supera Kurso formis sian Rondon kaj ĝuste klopodas ĉe kompetenta estraro por legaligi la statuton.



Karaj nunjaraj Kursgekolagoj!

Vi havas la enviindan honoron vizitadi la Superan Kurson en ĝia bela jubilea jaro.

Sen krio kaj bruo, eĉ nerimarkeble vi festas modeste tie, ĉe Jezuicka strato la jubilean jaron. Anoncas ĝin nek gazetaro, nek radio - laŭtparoliloj. Tia jam estis kaj estas la kursana kutimo. Sed ni, multenombra postkursana familio travivas ĝin senteme kune kun vi. Sekve akceptu de mi, unu el multaj estintaj samkursanoj la plej koran saluton kaj la plej sincerajn dezirojn de sukceso por

la Kurso en ĉi tiu solena kaj grava por ĝi jubilea jaro.

Bonvolu transdoni ĉi tiujn bondezirojn al Via Altestimata kaj Kara Sinjoro Direktoro Stanisław Dobrowolski, tiom fruktodone gvidanta la Kurson kaj al ĉiuj viaj Gesinjoroj Profesoroj.

Mi esperas ne esti sola ĉe ĉi tiuj miaj sentoj, kune kun mi estas sendube ĉiuj geedukitoj de la Kurso same esperantistaj, kie neesperantistaj.

Fr. Zontek.

## A Ŭ T U N O.

Selma Neeme.

*Mallume estas.*

*Aŭtuno festas*

*en la vasta natura koro.*

*Kaj dum tiu malfrua horo*

*ebria de soleco,*

*kontenta je vasteco*

*ĉirkaŭanta,*

*mi, vaganta,*

*nokten iras*

*mem, kaj miras*

*pro kio*

*do ĉio?*

*Kial verdadis*

*foliar'*

*en arbar',*

*kial kreskadis*

*florar',*

*sur herbar',*

*se forvelkos ĉio*

*kaj ne restos io?*

*Ĉu vere frukton estigas nur floro*  
*ke mem ĝi velku petal' post petalo?*

*Ĉu idon nutras patrin' kun doloro,*  
*ke falu ŝi mem en porviva batalo?*

*Kial*

*feliĉas geedza par'?*

*Tial*

*ĉu ĝojas, ke sen harar',*

*senamika,*

*korpe dika,*

*malsana je koro,*

*duonblinda de ploro*

*unun ĝojigu fremda bonsorto*

*kiam alian prenis la morto?...*

*Mallumadas*

*kaj pluvadas.*

*Mi sentas malsekon en la aero;*  
*mola de koto estas la tero.*

*En ĉiu arbo ombro pendas,*  
*kaj vento en la branĉoj plendas.*

*Subite ne ŝatas mi plu solecon,*  
*teruron enigas nur mallumeco.*

*Jen, frostaj fingroj ekpremas la koron!*

*Ho, kiel timas la noktan mi horon!*

*Tra nigra silento mi krias la vorton:*

*Mi timas, mi timas la morton!...*

★

*Rigardu, ekestas jam nova tago,*  
*jen, suno levigas el mezo de l' lago!*  
*Ruĝadas la akvo, kaj ondoj petolas,*  
*aŭtuno origi la mondon ekvolas.*

*Ĉie koloroj nun brilaj kaj helaj,*  
*kovras la teron tapiŝoj plej belaj.*

*Branĉo kantantun birdon tenas,*  
*la aŭskultanton ĝoj' ekenas.*

*Karesaj estas la melodioj...*

*Kaj varmon donas la sunradioj*  
*eĉ, dronigante en lumo la mondon,*  
*farante nun sian aŭtuntagan rondon.*

*Aŭtuno festas...*

*Kaj ĝoje estas.*

*Mi ne plu diras,*

*ho, kial la sorto*

*de l' hom' estas dorna, sencela.*

*Kial, mi miras,*

*ne venu eĉ morto,*

*se tiom ĝi estas bela?!*

Trad. H. Drezen

Tallinn.

## NACIA MUZEO EN WARSZAWA.

Nia patrujo en tempo de sia sendependeco posedis ne nur en preĝejoj, en reĝaj kasteloj kaj magnataj palacoj, sed eĉ en nobelbienaj domoj valoregajn riĉaĵojn en artverkoj. Tamen oftaj militoj kaj invadoj, kaj precipe ruinigoj dum kozakaj ribeloj kaj tataraj invadoj, kaj antaŭ ĉio teruraj tempoj de „inundo“ sveda, senigis ĝin pri tiuj trezoroj kaj detruis preskaŭ ĝisfunde. Dum dispartigoj de la lando kaj liberigaj militoj ĉiuj invadintaj ŝtatoj ĉiom, kion povis, rabis kaj elveturigadis de Polujo al si, por helpe de niaj artverkoj krei siajn, poste famajn, muzeojn. Malgraŭ tio eĉ tiuj ne multaj kaj ne grandaj fragmentoj, kiuj restis en la lando, prezentas kilektojn je grandega historio kaj materia valoroj.

Pollando, kiu dum unu kaj duona jarcento ne posedis sian propran ŝtaton, en periodo, kiam aliaj ŝtatoj kreis siajn grandiozajn muzeojn subtenate kaj helpate de propraj registaroj, povis tion efektiviĝi nur per oferemo kaj laboro de individuoj, venkante eĉ tio malhelpojn, kiujn preparis la invadintoj kaj en ĉiama timo pri ilia rabado. Malgraŭ tio ekestas kolektoj, kiuj hodiaŭ estas egalaj al mondfamaj muzeoj.

Similaj estas komencoj de Nacia Muzeo en Warszawa. En j. 1858 urbano Petro Florentini donacas sian bildkolekton al Lernejo de Belaj Artoj, ekestinta post fermo en j. 1832 de la universitato, kiu posedis apartan fakultaton de belaj artoj. Tiun donacon oni kompletigis per aĉetoj, kaj kiam en j. 1864 ankaŭ tiun lernejon oni likvidis, la urbo ricevis herede rimarkindajn kaj valorajn kolektojn, poste pliriĉigitajn per malavara ofero de Cipriano Lachnicki. Gi estis la ĝusta naskiĝo de Urba Galerio de Belaj Artoj, kiun en j. 1916 post forpelo de rusoj, oni ŝanĝis je Muzeo Nacia, disponigante por ĝi iaman palacon de uniaj episkopoj eĉ strato Podwale.

De tiu momento komenciĝas rapidega pligrandigo de muzeaj kolektoj: alfluas multaj donacoj, kaj la urbo, kiu estas posedanto de la Muzeo, ne ŝparas rimedojn por aĉeto de novaj objektoj kaj verkoj de arto.

La Nacia Muzeo arigas specimenojn de pola kaj fremda artoj, same el branĉo de pentrado, kiel de tiuj skulpta kaj ornama.

Dr Semerau-Siemianowski kaj A. Sobański donacas al ĝi siajn valorajn kolektojn, kiuj fariĝas fundamento de riĉa kabineto numismatika, kaj Dominik Witke-Jeżewski per sia grandioza donaco inaŭguras grandegan jam hodiaŭ kabineton de ilustraĵoj. Tiuj kolektoj kreskas tiel rapide, ke ne povas ilin ampleksi ilia ĝisnuna sidejo kaj estas necese konstrui grandan, modernan domegon, kiu respondus per sia aspekto kaj spaco al graveco kaj bezonoj de la granda muzeo. Nova, grandega domo, nune finata, kiun oni starigis eĉ reprezenta Aleo de 3 Majo, imponas per siaj dimensio kaj formo. Gi entenas en si la tuton de la kolektoj, kiuj hodiaŭ ankoraŭ estas disigitaj, escepte de fako de „malnova Warszawa“, por kiu antaŭ nelonge oni aĉetis du malnovajn domegojn de antikvaj urbanaj familioj: Baryczek kaj Szlichtyng. Malgraŭ la starigo de tiel monumenta konstruaĵo, ekzistas timo pri manko de loko en proksima venonteco, ĉar dank' al oferemo de la socio kaj de la urba estraro, kiu aĉetas pluajn objektojn, nombro de numeroj inventaraj superis jam cent dudek kaj kelkaj miloj kaj ĉiam kreskas. Ĉe la muzeo ekzistas ankaŭ konservatista laborejo, provizita per plej modernaj aranĝoj.

Muzeo Nacia en Warszawa estas hodiaŭ la plej granda en Pollando muzea posteno, ilustranta ne nur historion de arto kaj kulturo naciaj, sed ankaŭ tutmondan arton, ĉar fremda fako ebligas ekkoni tuton de la tutmonda pentrado. La Muzeo kondukas viglan agadon kultur-klerigan inter larĝaj homamasoj, dank' al kio la nombro de la vizitantoj tre rapide kreskas; ekz. en la lasta jaro ĝi kreskis pli ol kvinfoje, atingante 100.000 personoj.

Komence la Nacia Muzeo posedis militistan fakon, kiun poste oni apartigis en formo de speciala unuo — Muzeo de Militistaro, kiu troviĝas en la domego de Muzeo Nacia.

La Varŝava Muzeo Nacia apartenas hodiaŭ al unuarangaj en Eŭropo muzeoj, kaj en kelkaj fakoj ĝi estas eĉ senkonkura. Ni havas plenan rajton fieri pri tiu grandioza posteno de nia nacia atingajo kultura, tiom pli, ke tion, al kio alilande kontribuis fortostreĉoj de tutaj generacioj, helpate per subteno de potencaj ŝtatoj, ni kreis mem en malfacilegaj kondiĉoj de nacia vivo.

*Al ĉiuj societoj kaj gesamideanoj, kiuj bonvolis sendi al mi gratulojn kaj bondezirojn, mi korege dankas!*

*O. Bujwid.*



# KOMUNIKO DE LA SEKRETARIO DE LA KOMISIONO POR LA JUBILEA STELO.

La 8-an de aŭgusto 1937 dum la 29 Universala Jubilea Kongreso de Esperanto en Varsovio, en la granda salono de la kongresejo okazis la Festa Vespero de Veteranoj de la Esperanto - Movado.

La solenajon prezidis, en la ĉeesto de S-ro B. Wyszynski, prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, S-ro R. Sakowicz, sekretariis S-ro J. Litauer.

Post enkondukaj vortoj la orkestro ludis „Esperon“ kaj „Kanton de l'Ligo“ de Mozart kaj S-ro Julio Baghy prononis profundan kortuŝan paroladon dediĉitan al la rememoro de penoj kaj laboroj de unuaj pioniroj de Esperanto.

Dum la mallakta ludo de Funebra Marŝo de Chopin la inspirita oratoro alvokis unu post la alia nomojn de la plej unuaj kaj de la plej famaj ne plu vivantaj esperantistoj. En la plena salonego ĉiuj ekstaris. Korŝirmalgraje apenaŭ ludis la muziko, plore sonis la karaj neniam forgesotaj nomoj. Multaj okuloj estis plenaj de larmoj.

Kaj kiam ĉesis la funebra marŝo, Baghy entuziasme en la nomo de la grandega kulturmovado esperantista dankis la vivantajn pionirojn de la unua kvaron-jarcento de Esperanto.

La solenan paroladon de S-ro Baghy sekvis la publika disdono al la veteranoj per la prezidanto de la solenaĵo de atestoj kaj de jubileaj steloj.

La artaj atestoj enhavas la jenan tekston:  
„La XXIX Jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio 1937 decidis esprimi sian estimon per aljuĝo de la ..... jubilea stelo pro la pionira agado al ..... el ..... kiu aliĝis al la aktivaj batalantoj por la lingvo internacia Esperanto en la jaro ..... Varsovio, la 8-an de aŭgusto 1937. Prezidanto da la Kongreso: (-) prof. O. Bujwid, Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato: (-) B. Wyszynski, Sekretario de la Komisiono por la Jubilea Stelo: (-) Józef Litauer.

Laŭ la regularo de „Jubilea Stelo“, aperinta en la nr 1 — 2 de „La Jubilea“ (januaro-februaro 1937), organo de la 29 Universala Kongreso de Esperanto, al la esperantistoj, kies partopreno en la Movado datiĝas antaŭ la aŭgusto de 1905 j. estis aljuĝita la „ora“, al la esperantistoj, kies partopreno en la Movado datiĝas antaŭ la aŭgusto de 1912 j. estis aljuĝita la „arĝenta“ Jubilea Stelo.

La Jubilea Stelo estas mezgranda verda stelo kun ora aŭ arĝenta nombro „50“ en

la mezo, la stelo estas interplekita kun ora aŭ arĝenta laŭrobranco. La steloj surportas sur maldekstra flanko la numeron de la kongresna atesto. La steloj por viroj estas aljuĝitaj sur butono, por virinoj — sur broĉo. Ĝis nun la Jubilea Stelo estas aljuĝita al la jenaj gesamideanoj:

**Ora:** generalo Tadeusz Kasprzyck, pola ministro de militaj aferoj, Arne Arnessen, Carl Barthel, Louis Bastien, Leo Belmont, Paul Blaise, Herman Boucon. Ismael Gomes Braga. R. Déchaux, Ernest Deligny, Edinburga Esperanto Societo, Franciszek Ender, Adolf Feiner, Izzydor Fels, Corrado Grazzini, Zygmunt Greffkowitz, Roman Dobrzański. Stanisław Kamaryt, Leon Klimecki, Ivan H. Kresstanov, Marcel Laignier, Johan Lovli, Jean Jaques Monnier, National Institut for the Blind, National Library for the Blind, Stefan Nenkov, Albin Neužil, Paul Nylen, William Percy Merrik, Edmond Privat, Gustaw John Ramstedt, Eduard Stettler, Rollet de l'Isle, Wilhelm Robin, Georges Saget, Roman Sakowicz, Otto Simon, Kunitaro Takahaŝi, David Tenenbaum, Harald Thilander, Carl Thulin, Association Walentin Haüy pour le bien des aveugles, Hugo Vilhelm Salokannel, W. Willumsen, Aleksandro Antoni Zakrjevski, Adam Zamenhof, Jean Couteaux, Bolesław Gluchowski, Julian Jarecki, Leon Szejnman, Ignacy I. Krenicki, Józef Krenicki, Stanisław Szabuniewicz, Stanisław Essigman, Adam Gabriel Furmanik, August Sochacki, Juliusz Kriss, Emilian Loth, Leopold Lubliner, Władysław Pozner, Jan Günther, Teofil Koziara, Teodoro Kovacs, Aleksandro Laguer, Kajetan Seper, Gabriel Chavet, Mieczysław Czerwiński, Hans H. Kürsteiner, Jacob Schmidt, Emile Gasse, Roman Pallega, P. Pouchot, Mieczysław Rogalski, Prosper Couffinhal, Charles Fahrner, Eugeno Fuchs, Ludoviko Lajos, Stefano Molnar Nagy.

Jane Baird, Eugenie Cense, Regina Fels, Nesta Ford, Poittevin, Teofila Essigman, Fanny Uhrova - Krivancova, Rose Vogt, Zofia Zamenhof, Felicia Szyszko - Witulska, Paulina Muszkathlat, Aleksandro Dombrovski, Asile Recordon, Esperanto Societo Bern, Soeures Aveugles de St. Paul, Janina Ender.

**Arĝenta:** Léon Agourtine, Alf Arnesen, Henri Aubé, Julio Baghy, Oskar Baum, John Bergh, Robert Berg, Brazila Ligo Esperantista, Odo Bujwid, Modesto Carolli, Michał Chmieliński, Edgar de Coster, Rajmund Cech, Antoni Czubryński, Andreo Cseh, Esperanto - Societo „Danubio“, Andreo Deistler, Les Denysiuk, Didrik Didriksen, Jergu Dinju,

W. Doroŝenko, René Dubois, O. J. Elveren, Alfred Engländer, Balkay Géza, Marian Grodzki, Albert Gustavsen, K. Geršater, Solti Györdy, Ekedalen Hallin, Olans Halvorsen, Henry W. Hetzel, J. V. Holleman, Edward Imsdahl, Harry Ingham, J. R. G. Isbrücker, Hnat Jakimeczuk, Hans Jakob, Janovich Lajos, Sam Jansson, Ausländer Jenő, Leopold Dreher, Peter Johanessen, Sigrid Johanessen, Hugo Jokl, Teo Jung, Rudolf Kaftan, Kolomano Kalocsay, Halfdan Kartierud, Anatolo Koli, Emil Kolodziej, Antonio Krtsmayr, Moriz Lackenbacher, Józef Litauer, Stefan Lubliner, Seth Linnegren, E. Mage, C. Mattsen, Józef Migacz, Bano Miklos, Hagbart Mörk, William R. Mackay, Anton Nilsson, Adolf Oberrotman, Pataki Ignac, Andreas Pedersen, Stanisław Pęksa, A. C. Peterssen, Emil Pfeffer, Oskar Popper, Leon Rosenstock, Wilhelm Sandberg, Franz Josef Schade, Josef Schamanek, Ludwig Sengebusch, Vilho Setälä, Karl Otto Sikor, Hugo Sirk, O. Brochmann, Sletterod, Romuald Sołowiecz, Olaf Støren, Jakub Szapiro, Rafael Tancredi, Samuel Źsulc, Ramizo Turi, Edward Wiesenfeld, F. Staes - Vandervoorde, R. F. Vanghan, Kazimierz Zajaczkowski, Oskar Zimmermann, Julius Glück, Hugo Steiner, Stanisław Karolczyk, Stanisław Sudelik, Benedykt Herold, Jan Kostecki, Leon Ferencowicz, Cecil C. Goldsmith, John Johansson, Tadeusz Kaciczak, Włodzimierz Miernicki, Kenji Ossaka, Sfanisław Rudnicki, Hideo Yagi, Henryk Schnützer, Edward Spielmann, Stanisław Braun, Jozefo Koch, Władysław Mergel, Włodzimierz Pfeiffer, Paul Uline, Dienes Endre, Józef Friedrich, Holley Bela, Kazimierz Tyminiński, Vakok József nádor kir. orsz. intézete.

Hanna Anderssen, Eileen de Burgh Daly, Rosa Bye, Anna Dirnova, Helmi Dresen, Signe Helgerssen, Matilda Hershkovici, Klara Hruby, Julia C. Isbrücker, Carla Jacobsen, Antoinette Jenen, Gerda Julin, Hedwig Kaes, Eva Karlssen, Schultz Katalin, Agnes Melchior, Amelia Maggusson, Ridet Margit, Molnar Maria, Agnes G. Macfarlane, Minna Miksch, Hanna Nilsson, Nila Nilsson, Melania Pietsch, Mario Polednova, Ada Pyntu, Emma Raff, Astrid Sirevog, Howard Sondford, Elly Staes, Lewissa Strandman, Anna Weinstein, Izidora Wołoszczak, Lidia Zamenhof, Julia Neubergowa, Helena Dawidow, Marie Charlotte, Merrick, Leonia Weiler, Helmi Josefsson, Renee Uline, Stefan Teréz.

Ĉiuj senescepte personoj, kiuj jam ricevis la atestojn kaj la stelojn, bonvolu nepre kvitanci je suba adreso pri tiu ricevo nur per simpla poŝtkarto kun la detala adreso kaj profesio de la ricevinto kaj la n-ro la Stelo.

Ĉiuj jam ricevintaj la jubilean stelon, kon-

forme al la anonco sur la paĝo 34 de la Kongresa Libro, bonvolu, se ili tion ankoraŭ ne faris, pagi, se ili ĉeestis la kongreson por stelo kaj atesto kune — 2 zl, se ili ne ĉeestis la kongreson — 4 zl.

La supre cititaj personoj, kiuj ne ankoraŭ ricevis la jubilean stelon kaj ateston bonvolu pagi al la suba adreso — po 2 zl aŭ po 4 zl, laŭ tio ĉu ili ĉeestis aŭ ne ĉeestis la kongreson, krome ili pagu por sendkostoj (rekomendite): en Polujo 90 gr, ekster Polujo: 1'30 zloty.

La esperantistoj aliĝintaj al la Esperanto-movado antaŭ la aŭgusto 1905 (ora stelo) kaj antaŭ la aŭgusto 1912 (argenta stelo), kiuj ne estas supre cititaj, povas ankoraŭ ricevi la jubilean stelon kaj ateston, se ili skribos pri tio al la suba adreso kaj pagos: la ĉeestintoj la kongreson — 2 zl, la neĉeestintoj la kongreson — 4 zl kaj por sendkostoj (rekomendite) en Polujo: 90 gr, ekster Polujo — 1'30 zl. Bonvolu komuniki: viajn antaŭnomon, nomon, adreson kaj la jaron de aliĝo al la Esperanto-movado, se eble kun iaj pruvoj plej malfrue por la Eŭropaj landoj ĝis la 15 de novembro 1937, por la ekstereŭropaj landoj ĝis la 15 de decembro 1937. La pagoj de 2 aŭ 4 zl devas kovri la elspezojn por la pretigo de steloj, atestoj kaj la aranĝo de la Festo de Veteranoj.

Dum la Jubilea Kongreso aperis projekto pri la fondo en Warszawa de la internacia „Rondo de Veteranoj de Esperanto“ grupiganta esperantistojn de antaŭ — 1-a de aŭgusto 1912, kaj celanta per plifaciligado de interrilatoj de la membroj kreskigon inter ili de la fortika sento de solidareco por eventuala kreo por ili de servaro de reciproka morala kaj materiala diversspeca helpo.

La veteranoj, dezirantaj kunfandi kaj aliĝi al tiu ĉi Rondo, bonvolu skribi pri tio al la suba adreso kaj enpagi la enirkotizon de 1'50 zl (por la unuaj korespondelspezoj).

Samtempe skribi (legeble) al la sola adreso de la Komisiono por la Jubilea Stelo:

S-ro J. Litauer, Warszawa, Pollando, Marszałkowska 81.

Nepre sendu al tiu ĉi adreso ekzemplemon de via gazeto kun la enpresita komuniko.

(-) J. Litauer

sekretario de la Komisiono  
por la Jubilea Stelo.

Septembro, 1937.

Al niaj abonantoj, legantoj kaj amikoj ni sendas tre korajn dezirojn ĝoje pasigi la **Kristnasko-festotagojn** kaj ĉion plej bonan en la **Nova 1938 Jaro**.

**La Redakcio kaj Administracio  
de Pola Esperantisto.**



## FRAGMENTO EL „GRAFO LUKSEMBURG“.

*Alportos mi, knabeto,  
Pro sci' pri via gust'  
Kavetojn ĉe buŝeto  
Kaj amon en la brust' —*

*Se tio malsufiĉos,  
Mi scias pri avid',  
Deserton mi dediĉos,  
Nur venu apetit'!*

*Elpoligis inĝ. M. Chmieliński  
Toruń.*

## DEZIRARO.

*Mi vin petis pri fingreto...  
Tutan manon vi etendis,  
Kaj pro tiu ĉi maneto  
Trosufiĉa — mi ne plendis.*

*Kiam poste jam plendanke  
Mi vin petis pri maneto,  
Ambaŭ donis vi senmanke  
Kaj ruĝiĝis mi pro l'peto,*

*Ĉar mi pensis, se estonte  
Ambaŭ manojn volos mi,  
Kaj ekpetos ja senhonte,  
Kion tiam faros vi.*

*Elpoligis inĝ. M. Chmieliński  
Toruń.*

## NAIVULO.

*Knabineto! kison donu!  
Vi koleras? Nu, pardonu.  
Via estas opini',  
Ke naiva estas mi.*

*Sed naiva mi ne estas,  
Ĝi prudenton nur atestas,  
Ĉar ja estas ne sekret',  
Kion volas knabinet'*

*De nuntempa nia mond'.  
Ne ruĝigu pro la hont'.  
Ver' konata, ke bongustas  
Tio, kio kun vol' ĝustas,*

*Se ne dirus mi averte,  
Por mi estas tute certe,  
Ke vi estus sen preparo  
Al de mi celata faro;*

*Ĉar unua mia pet'  
Estis nura avertet',  
Same via la koler'  
Estis nur konsentfajrer'.*

*Do ni nun jam plene kvitas,  
Ĉesu, vortoj nur ekscitas,  
Venu volo por gustum',  
De de mia pet' plenum'.*

*inĝ. M. Chmieliński  
Toruń.*

## POLLANDA KRONIKO.

**BYDGOSZCZ.** En la ŝtata gimnazio je la nomo de Marŝalo Piłsudski okazis la 4 XII solena kurfiniĝo por lernantoj de la III-a klaso. Ĝi granda salono kolektiĝis pli ol 50 kursanoj kaj 14 plenaĝuloj (4 gimnaziaj direktoroj, 7 profesoroj, 2 reprezentantoj de la Gepatra Rondo kaj s-ano Wielicki, vicprezidanto de la distrikta tribunalo). Speciale invitataj por ĉi tiu solenaĵo estis lerneaj vizitatoroj el Kleriga Ministerio kaj el Lerneaj Kuratorioj. Bedaŭrinde, neniu el eksterlokaj eminentuloj alvenis. Ili sendis nur leterojn, senkulpiĝante, ke la manko de tempo ne permesas al ili ĉeesti la kursfiniĝon. Ĉeokaze ili hondeziris sukcesojn kaj dankis al prof. Sygnarski por lia sensalajra laboro sur la lerneja kampo.

Precize je la 12-a horo komenciĝis mal-

ferma parolado de la kursgvidanto, dum kiu okazis ankaŭ tralego de kelkaj pli gravaj gratulletoj. Ili bonege impresis la tutan aŭskultantaron. Entute alvenis 20 korespondadoj el diversaj landoj, pri kiuj menciis la gvidanto. La programo de la solenaĵo prezentis sin jene:

1) Malferma parolado de prof. Sygnarski (tralego de gratulletoj), 2) Malnova leciono (mallongigita) — pri anatomio: de homo, 3) Nova kaj lasta leciono nro 15: a) partipo aktiva kaj pasiva, b) gaja rakonto pri kongresanoj, c) tabelo de pronomoj kaj proverboj, 4) Adiaŭparolado al kursanoj (oficiala fino de la elementa kurso), 5) Lernantoj parolas: a) Dankparolado por la kurso de Klodnicki, b) Skoltaj dialogoj en internacia tendaro (prezentis: Mazurkiewicz —

Polo, Czechowski — Hungaro, Fifelski -- Anglo, Pokora — Franco, Kurland — Italo, Pawłowski — Germano, Kurland — Dano, Tomczak — Svedo, Kosieniak — Japstro 6) Ekzamenado de kursano (farita de pasfro prof. Kukulka), 7) Disdonado de atestoj kaj premioj al la plej diligentaj kursanoj, 8) Ferma parolado de gimnazia direktoro POLAKOWSKI.

La unua parto de la programo sukcesis bonege. La lernantoj respondis bone, ankaŭ dum la speciala konversacio kun s-ro pastro Kukulka. La „Skoltaj dialogoj“ verkitaj de unu el junaj lernantoj post apenaŭ 13-a leciono (!), estis prezentitaj de kursanoj senriproĉe kaj vekis al nia lingvo grandan interesigon inter geinstruistaro. Impresiga estis ankaŭ la parolado de gimnazia direktoro S-ro POLAKOWSKI ĉe okazo de atest-disdonado.

Post la Kristnaskaj ferioj komenciĝos je la insistita peto de lernantoj supera kurso laŭ la ŝtate aprobita lernolibro de prof. Sygnarski. Nuntempe multaj lernantoj komencis jam interesanĝon de korespondadoj kun eksterlandaj samaĝuloj.

### Prof. Sygnarski dankas.

Rilate al la kursfiniĝo de Esperanto, okazinta la 4 XII 1937 en la ŝtata gimnazio je la nomo de Marŝalo Piłsudski en Bydgoszcz — prof. Sygnarski informas nin, ke li ricevis **libro-premiojn kaj gratulleterojn** de sekvantaj samideanoj:

1. Prof. dr Odo Bujwid — Kraków.
2. Prof. dr Lubieniecki — Poznań.
3. S-ino J. Jayet — Morges, Svisujo.
4. Redakcio de „Pola Esperantisto“ — Kraków.
5. Redakcio de „La juna vivo“ — West-graftdijk, Nederlando.
6. S-ro Max Brückner — Bayrischzell, Germanujo.
7. S-ro Kurth Schönrich — Wiesbaden, Germanujo.

**Nur leterojn kaj bildkartojn** de sekv. samid.:

8. Dr Czubyński Antoni — Włochy k. Warszawy.
9. S-ro Pastro Cseh — Hago, Nederlando.
10. Red. Teo Jung (Heroldo de Esperanto) — Scheveningen, Ned.
11. S-ro Ackermann — Düsseldorf, Germanujo.
12. F-ino Van der Graaf — Dordrecht, Nederlando.
13. S-ro Rag. Giovanni Tanzi — Milano, Italujo.
14. Dr jura Adolf Goedecke -- Sonderborg, Danujo.

15. S-ro W. Kapka — Chojnice, Polujo.
16. S-ro Izdebski, Sekciestro de Lerneja Kuratorio en Poznań.
17. S-ino Sheppard R. Nora -- Northfield, Birmingham, Anglujo.
18. F-ino Lilian Maynard (por lernantinoj de Tinkers Farm Lernejo) -- Northfield, Birmingham, Anglujo.
19. S-ino E. Norman — Northfield, Birmingham, Anglujo.
20. F-ino Rose Mc Gough (por gelernantoj de klaso la Kings Norton Council School) — Northfield, Birmingham, Anglujo.

Por ĉiuj leteroj kaj libroj, kiuj estis dum la solenaĵo disdonitaj inter la plej diligentaj kursanoj, s-ro prof. Sygnarski esprimas al ŝatataj kaj oferemaj samideanoj sian plej sinceran dankon!

**CIESZYN.** Esperantokurso en Cieszyn. La estraro en Cieszyn de „Uniwersytet Powszechny“ aranĝis ĉi jare krom la kutimaj ankaŭ esperantokurson. Car anoncis sin 132 personoj, sinjoro Krysta gvidas la kurson (Ĉe-metode) en du grupoj. — Estas necese penadi pro aranĝo de tiaj kursoj en ĉiuj aliaj lokaj sekcioj de „Uniwersytet Powszechny“, kie estas al dispono la necesaj esp. - instruistoj. Se oni al tiuj sekcioj akcentos la bonegan propagandon, kiun faras esperanto en la tuta mondo por Polujo, certe ĉie estos same eble aranĝi esperantokursojn kiel en Cieszyn.

Se ia institucio esperantista en Polujo transprenos la aranĝon, sinjoro Krysta volonte edukos en dumferia kelktaga kurso la emulojn al Ĉe-metoda instruado. Ĉu en Cieszyn, tie estus la restado ne multekosta kaj agrabla, - ĉu en Zakopane, tie estus la restado tre interesa kaj tre agrabla.

**KRAKÓW.** La 4 XI k. j. aranĝis „Societo Esperanto“ en Kraków kun „Finna Societo Esperanto“ en Helsinko en granda salono de Industria Muzeo dank'al klopodoj de s-ano Schnützer „Finnan Vesperon“, dediĉitan al la „lando de mil lagoj kaj blankaj noktoj“.

La programo konsistanta el plej karakterizaj finnaj poeziaĵoj kaj kantoj estis tre interesa. Antaŭparolis prof. dro Bujwid, pri finna muziko parolis s-ro Augustynek, pianludis s-ro Skolyszewski. Al ĉiuj tre plaĉis finnaj popolkantoj, en esperantan lingvon tradukitaj, tre bele kantitaj de s-ino Emma Woriska-Ormicka kaj de nia krakova kantistino Celina Nadi ĉe subtila akompano de s-ro Ormicki. Tre interesa estis la prelego kun lumbildoj de s-ro Diamant, donanta



vivantan bildon pri tiu mistera kaj tre kultura lando.

Partoprenis la belan vesperon ĉirkaŭ 200 personoj.

La 29 XI k. j. okazis la Ĝenerala Kunveno de „Societo Esperanto“. La Estraron eniris kiel: prezid. Prof. Dr O. Bujwid, vicprezid. Dr Rosenstock, sekr. Bromek, viceskr. kaj aranĝoj H. Dattnerowa, kasist. Kutscher, v-kasist. Rittermann, prelegoj J. Neubergowa, kursoj Dr Dreher, bibliot. mgr

Tydor. Rev. Kom.: Maria Szczepańska, Prof. Kowalski, Wiesenberger.

Dro Rosenstock en nomo de la Estraro kaj ĉiuj krakovaj samideanoj okaze de 80 jara naskiĝtago de Prof. Dro Bujwid, plej kore bondeziris al Li pluan bonegan sanon kaj prosperon por bono de nia movado kaj ĉiuj societoj kaj movadoj en kiu la Estiminda Jubileulo tiom aktive partoprenas. La vortojn de la parolanto la aŭskultantaro akceptis per varmaj aplaŭdoj kaj vivukrioj.

## KATOLIKA ESPERANTO MOVADO.

### URĜA KAJ GRAVEGA

por la vizitintoj de la Unua Eŭkaristia Esperanto-Mondkunveno!

La nombro de la sinanoncantoj por la 34. Eŭkaristia Kongreso estas tiom granda, rilate al la disponeblaj loĝlokoj, ke oni baldaŭ devos rifuzi la akcepton de pluaj aliĝoj.

Kiu de ĉeesti volas, bonvolu kiel eble plej baldaŭ aliĝi!

La unuan Eŭkaristian Esperanto-Mondkunvenon povas partopreni nur tiuj, kiuj unue aliĝas al la 34. Intern. Eukaristia Kongreso kaj al tiu ĉi oni povas

aliĝi nur pere de la landaj komisionoj, aŭ en landoj, kie ne ekzistas tia, pere de la tieaj vojaĝoficejoj. Ankaŭ ili donas detalan informon pri ĉio.

Kiuj intencas partopreni la Unuan Eŭkaristian Esperanto-Mondkunvenon, tion aparte devas anonci al la Esperanto-Subkomitato, Budapeŝto, Petőfi Sandor u. 9. IV. 3., aldonante 4 respondkuponojn, kiel kotizon.

La broŝuroj elĉerpiĝis, la afiŝoj kaj glumarkoj ankoraŭ ne estas pretaj, ni do petas kelksemajnan paciencon.

*Esperanto Subkomitato de la  
XXXIV. Internacia Eukaristia Kongreso*

## ESPERANTO EN LA PRAKTIKO.

La „Esperanta Komerca Asocio“ (EKA) celante la disvastigon de Esperanto kaj la plifaciligon de la internaciaj komercaj rilatoj, publikigos en la venonta Januaro, Februaro, specialan, taŭgan broŝuron nome

**EKA - BULTENO.**

Ĝi aperos monate kaj estos sendata senpage al la delegitoj de IEL kaj UEA, al ĉiuj interesitoj, komercistoj, industriistoj, hoteloj, kuraĉlokoj, komercaj ĉambroj k. c. La samideanoj, postulu la Bultenon al: **Gentra Oficejo de EKA - Via Nazionale 208 - Romo (Italio)** kaj kunlaboru, aliĝante al EKA kiel korespondantoj por komercaj roj aŭ kiel perantoj por komercanonoj. La aliĝontoj

ricevos kompencon proporcie je la efektivigatoj enspezigoj.

Por plifaciligi ĉies taskon, la „EKA“ prezigos la komercanonojn laŭ la jena tarifo, kontraŭ pago post publikigo de la bulteno enhavanta la kernan anoncon.

Ĉiujn informojn oni postulu de:

„EKA“ - Via Nazionale, 208 - ROMO.

### Tarifo

de la anoncoj en „EKA-BULTENO“ (formato cm 34×24)

Unu paĝo italaj liroj 400 monate			
1/2	„	„	250 „
1/4	„	„	150 „
1/8	„	„	80 „

aŭ egalvaloro en nacia mono.

## FRATECO.

En ĉiu nova n-ro portas al vi seriozan legaxon, altan idealon, kaj instigon al nova racia laŭntara vivo.

Abonkoto 1 sv. fr. 3 resp. kuponoj kaj ĉiu egalvaloro.

Adreso: **Fratego**, gazeto por frateca vivo, **Sevlievo (Bulgarujo)**.

X-a SOKOL - OLIMPIADO PRAHA 1938, ilustrita faldprospekto pri la festoj de la Ĉeĥoslovaka Gimnasta Asocio SOKOL, okazontaj en julio 1938. 8 pĝ. 15 x 10 cm. Senpage ricevebla ĉe: Ĉeĥoslovaka Esperantista Informejo Praha XIX Uralské 9.

\*

Ilustritan faldprospekton pri Ĉeĥoslovakio senpage sendas al niaj legantoj: Ĉeĥoslovaka Esperantista Informejo Praha XIX Uralské 9.

\*



Ĉu vi jam legis la rakonton de  
**Henryk Sienkiewicz: Orso**  
trad. A. Oberrotman.  
**Prezo: zł 1.10 kun afranko.**  
Mendu tuj ĉe „Pola Esperantisto“  
Kraków, Lubicz 34. Konto PKO. 406.660.

**NI TRE AFABLE PETAS NIAJN ABO-**  
**NANTOJN, SULDANTAJN ANKORAŬ LA**  
**ABONON POR J. 1937 PAGI LA SULDON**  
**JE NIA KONTO PKO Nr 406.660.**

### OBNIŹKA ABONAMENTU!

Kaŝdy abonujĉy na rok 1938 miasięcznik  
„Pola Esperantisto“ wplaca do dnia 31 grud-

**tylko zł 6.50.**

Po tym terminie abonament wynosi zł 8.—  
rocznie.

### Korzystajcie ze zniŹkil

Równocześnie komunikujemy, iŹ zalegaj-

### UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miasięcznika  
„Pola Esperantisto“ uskuteczniać moŹna na  
konto PKO. Nr 406.660 lub **przekazem**  
**rozrachunkowym, kartoteka Nr 29,**  
co zaoszczędzi wplacajĉym koszty przesyłki.

## LA NOVA pro LINGVA REVUO

SENDEPENDA ĴURNALO PRI CIA ESPE-  
RANTA PRESAĴO

**Direktoro: CORRADO CERRI**

Ideala gazeto absolute sendependa de ia  
ajn intereso, ĉu materiala, ĉu eldonista, ĉu  
verkista — Vere amika de ĉiu subtenanto  
kaj disvastiganto de la lingvo Esperanto sen-  
depende de sektaj bataloj —  $\frac{1}{12}$  paĝa —  
formato cm 35×25 Spegulo de nia litera-  
turo. Kunlaboras multaj lertuloj.

NECESEGA AL ĈIUJ GRUPOJ KAJ AL  
ĈIUJ INSTRUISTOJ.

### PETU PROVEKZEMPLERON!

sendante fermitan leteron enhavanta unu  
poŝtrespondkuponon internacian. Prefere sen-  
du rekomenditan leteron!

**VI FARIĜOS TUJ NIA DILIGENTA LE-**  
**GANTO KAJ ABONANTO!**

Ne prokrastu vian peton! Skribu hodiaŭ  
**CORRADO CERRI** — Instruisto —  
RAMAZZANO

(Italujo - Perugia).

### ATENTU! UNIKA OKAZO!

Pola numero de „Literatura Mondo“, eldo-  
nita okaze de la XXIX Jubilea Universala  
Kongreso de Esperanto en Varsovio, estas  
aĉetebla nur por

**zł. 1.50** (anstataŭ zł. 2.75).

Ne pre aldonu tuj 0.30 por afranko. Por re-  
komendo aparte 0.30. La sendaĵon nere-  
komenditan ni ne garantias. Eksterlandanoj  
pagas por la numero nur 4 respondkuponojn  
(afranko rekomendita).

Skribu al reprezentantino de Literatura Mon-  
do por Polujo — **Halina Weinstein,**  
**Warszawa, str. Leszno 99/5, PKO.**  
**Nr. 27.867.**

Por korespondado ne pre aldonu poŝtmarkon  
aŭ respondkuponon.

Rimarko: nemulte da numeroj ankoraŭ restis.